

BELGA ESPERANTISTO



MONATA REVUO



Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

redaktata de VAN DER BIEST-ANDELHOF, direktoro :

LÉON CHAMPY, FRANS SCHOofs kaj

OSCAR VAN SCHOOR.

ABONPREZO :

Belglando . . . Fr. 4.— (Sm. 1.60)

Eksterlando . . . Fr. 5.— (Sm. 2.—)

Unu numero . . . Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,
(rue de la Petite Ourse), Antwerpen,
Anvers.

Abonoj kaj Monsendoj : 20, Vondel-
straat (rue Vondel), id.

Jurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Arend-
straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por
si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

Esperanto kaj la lingvoj de malvastaj landoj

Dum la malferma kunsido de la Dresdena kongreso mi havis la honoron reprezenti la esperantistojn de la flandra parto de Belgujo.

En mia mallonga parolado mi montris, kiom ni, Flandranoj, amas nian naskigan teron, la flandran vivadon, la flandran arton kaj speciale la flandran lingvon, esprimon de nia originaleco.

Mi vokis la atenton sur la ĉiam kreskantan alfluon de la grandaj lingvoj kaj sur la danĝeron, minacantan tiujn de la malgrandaj popoloj. Mi salutis, kiel ilian savantan genion, Esperanton, la helpan lingvon, unu kaj saman por ĉiuj, kiu forigos la superregadon de kelkaj potencaj lingvoj kaj ebligos al la malgrandaj popoloj sin dediĉi, kore kaj anime, al sia kara gepatra idiomo.

Diversaj oratoroj parolis samsence, inter aliaj mia eminenta amiko, S-ro Patrick Parker, kun kiu mi jam havis la honoron konatiĝi en Kembriĝo, kie ni longe preparolis la staton de la irlanda kaj de la flandra lingvo, respektive subpremataj de la angla kaj de la franca.

En Dresdeno ni denove interpritraktis la saman temon kaj ni opiniis pri la ebleco, kunigi dum la Barcelona kongreso samideanojn el niaj ambaŭ landoj, el Finnlando, Bohemujo, Polujo, Katalunujo kaj aliaj regionoj, kie ekzistas simila situacio. Je tiu okazo oni starigus internacian ligan, kiu efike povus favori la klopodojn de niaj samsortanoj. La anoj de tiu ligo povus interŝanĝi multvalorajn sciigojn, komuniki inter si dokumentojn kaj koniĝi kiamaniere estas gvidata en sia lando la batalado por la akiro de la naturaj lingvaj rajtoj.

Ni, Flandranoj, povus sciigi pri nia « flandra movado », kies celo estas revivigi la flandran literaturon, la flandran arton kaj plialtigi la intelektan nivelon de la flandra popolo, al kiu ĝi volas havigi la rajton esti instruata, juĝata kaj regata per sia propra lingvo. Interese estus certe por la alilandanoj ekscii ke, de la unuaj jaroj de la belga sendependeco (1830), kiam la flandra lingvo estis malŝatata kaj malkonfesata, la Flandranoj jam konstatis multajn progresojn kaj sukcesojn, dank' al la senhaltaj klopodoj de la Flamingantoj (*), kiuj ne demetos la armilojn, antaŭ ol ili estos akirintaj la plenan egalecon inter la lingvoj ekzistantaj en Belgujo.

Sammaniere la flandra loĝantaro en Belgujo sekvus kun granda intereso la lingvan movadon en aliaj landoj.

Kun mia amiko Parker mi ege deziras la starigon de internacia ligo por favori la akiron de la lingvaj rajtoj en la malvastaj landoj kaj regionoj.

Kompreneble, la agadoj de tia ligo devus esti tre pacemaj, neniel ofendemaj aŭ akre atakemaj. La ligo devus, kiel mi diris ĉi supre, ĉefe celadi interŝanĝi reciprokajn informojn kaj klarigojn, kaj, influante sur la tutmondan publikan opinion, samtempe ili influos sur la estrarojn de la grandaj ŝtatoj.

V. d. B. - A.

Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIIIa esperantisto

La prezidanto de la Madrid'a grupo esperantista vizitis la hispanan Reĝon por donaci al li la numeron de la esperantista gazeto *La Revuo*, kiun, lukse binditan, ĝia redakcio dediĉis al li, kiel Honora Prezidanto de la 5a kongreso.

Dum la interparolado, la prezidanto de la Madrid'a grupo faris mallongan raporton pri la kongreso kaj la postkongreso. La Reĝo, kiu kore aprobas nian celon, aldonis ke li lernis esperanton, kion li pruvis, per legado kaj tradukado de peco el la gazeto al li donacita, kaj ankaŭ li diris, ke estus konsilinda la lernado de Esperanto al la diplomatiistoj. Poste la prezidanto de la grupo, je l' nomo de D-ro Zamenhof, dankis la Reĝon pro la honoro, kiun li faris al nia kara Majstro nomante lin Komandoro de Elizabeto la Katolika. La Reĝo respondis, ke tio ne meritas dankon, ĉar li nur faris iom da justeco al la granda merito de la elpensinto de nia lingvo.

(SUNO HISPANA.)

(*) Jen la nomo donata en Belgujo al la flandramuloj, kiu defendas la rajtojn de la flandra lingvo.

MAJA KANTO

Laŭ la germana melodio
Wenn's Mailüfterl weht..

Esperanta teksto de
FRANS SWAGERS

Al tre rapide

La ter - on ka - res - as la maj - a vent -
et' Kaj, mir - u! Jen lev - as sin ĉi - u flor -
et. Post long - a si - lent - o en vint - r - a se -
zon', La bird - oj kant - ad - as, La bird - oj kant -
ad - as, La bird - oj kant - ad - as En plej gaj - a
ton! La bird - oj kant - ad - as En plej gaj - a ton!

2. Printempo revenas kun nova fortec'
Sed homojn ĝojigas nur unu junec':
La birdoj forflugas, revenas kun bru'!
La homoj foriras,
La homoj foriras,
La homoj foriras, { dufoje
Ne revenas plu.

Ĉiuj kantoj aperintaj en « Belga Esperantisto » estas aparte aĉetebaj en la Centra Esperantista Belga Oficejo, ĉe O. Van Schoor, 20, Vondelstraat (rue Vondel), Antwerpen (Anvers).

Ĉiu ekzemplero kostas 10 centimojn.

Gratuloj

« Belga Esperantisto » prezentas al Ĝesinjoroj **Miluta Simion**, el Bukureŝto, plej sincerajn gratulojn kaj plej korajn bondezirojn por la feliĉo de ilia novnaskita file **Gabrielo-Esperanto**.

Rerigardo al la jaro 1909,

de Profesoro P. CHISTALLER, (Stuttgart).

El Germana Esperantisto, N-ro de Januaro 1910.

(Daŭrigo kaj fino.)

Pri la interrilitoj estas citinde, ke 60 oficistoj de la *Sächsisch-böhmische Dampfschiffahrtsgesellschaft* (Saksa-bohema societo de vaporŝipveturado) lernis Esperanton; en Frankfurto s/M kaj en Munĥeno ekzistis kursoj por tramvojojficistoj, ankaŭ en la holanda ĉefurbo Hago, kie la oficistoj, okaze de la naskiĝa tago de la Reĝino, ornamis tramveturilon per esperantaj emblemoj. La societo por favori la interrilitojn en la franca provinco Anjou (elp. Anju) eldonis en la helpa lingvo gvidlibron tra la regiono. Same en la fama glaciejo-ĝardeno en Lucerno estas havebla priskribo, en la internacia lingvo, de tiu vidindaĵo.

La **Universala Esperanto Asocio**, kiu ĉefe sin okupas pri komerco, industrio kaj interrilitoj, havis en Barcelono brilan jaran kunvenon. D-ro Zamenhof nomis ĝin « la vera efektiviĝo de la Esperantismo »; ĝi jam kalkulas pli ol 5000 membrojn, kaj ĉiutage kreskas ĝia influo. Inter la urboj kiuj eldonis gvidilojn en monoformato ni citas: Birmingham, Bordeaux, Debreczin, Diĵono, Ĝenevo, Godesbergo (kie oni starigis la « *Rejna Esperantujo* »), Louhans, Neuchâtel, Prago, Reichenhall, Roterdamo, Troyes. Multnombraj firmoj, i. a. la vojaĝa agentejo Cook & Son, aliĝis al U. E. A. kiel « Esperantiaj entreprenoj ».

Inter la novaj profesiaj societoj estas citindaj la « *Internacia Asocio de Bankistoj* » (Sidejo en Dresdeno), la *Ligo de la Diamantlaboristoj* » (Sidejo en Antverpeno *), en Germanujo la « *Esperantista Laborista Ligo* », kaj fine la de la artisto S-ro K. Schwartz starigita « *Varietia Esperantista Ligo* ». La jam de longe ekzistanta asocio de kuracistoj T. E. K. A. kalkulas pli ol 600 anojn (**). La katolikoj kunvenintaj en Barcelono decidis organizi ĉiujare internacian katolikan kongreson; tio estos la unua tia aranĝo kie, krom Esperantujo, nia lingvo internacia estas la sola interkomprenilo.

Rilate al aliaj kongresoj estas ĝojege sciiginde, ke, krom la ĉiam pli ofte okazanta rekomendo de la helpa lingvo, jam ĉe du, Esperanto estis uzata samrajte kiel naciaj lingvoj: en Ĝenevo, ĉe la psikologa kongreso, kaj en Budapeŝto, ĉe la kongreso de la kuracistoj.

La internacia instituto de la Paco ricevis por sia premia konkurso tri disertaciojn en Esperanto.

(*) Tiu sciigo estas erara; tamen multaj diamantlaboristoj aliĝis individue la esperantistan movadon. (Noto de la traduktinto)

(**) Tiu nombro nun jam superas 1000. (Trad.)

En la fako de **Arto kaj Scienco** ni ankaŭ povas konstati bonajn progresojn. Krom la aktoro Reicher (Berlino), ankaŭ lia holanda kolego Poolman (Amsterdamo) varme defendis la disvastigadon de la Zamenhofa lingvo; konataj estas ankaŭ la sukcesoj laŭ tiu senco en Barcelono. La Muzika Akademio en Valencio presigis en la helpa lingvo alvokon por la internaciaj konkursoj. En Francujo oni eldonis *Muzikan Terminaron*.

Franca kuracisto, D-ro Corret, elektis Esperanton en ĝia rilato al la medicinarto kiel temon por sia doktora tezo; pola kuracista revuo resumas esperanten ĉiun originalan artikolon; tiuj resumoj tiam estas eldonataj kiel speciala aldono. S-ro Foerster, sekreta konsilanto en Charlottenburg, laboras por la efektiviĝo de internacia nombra sistemo, laŭ la modelo de la esperanta.

Inter la plej gravaj paroladoj per Esperanto ni citu tiun de ingeniero Backhäuser (Rio de Janeiro) en Parizo pri Brazilujo, — de Prof. D-ro Lederer el Prago en Dresdeno pri Leonardo da Vinci, — fine la klarigon pri aerverurado de S-ro Archdeacon en Parizo, dum la tiea ekspozicio pri aerveturado.

La *Meksika Scienca Asocio* ankaŭ organizis konkurson kun temo pri Esperanto. La *Amerika Scienca Kongreso* en Santiago (Ĉilujo), prenis du konkludojn por Esperanto, el kiuj unu por postuli el la Registaro de la Unuigitaj Statoj la enkondukon de Esperanto kiel ĝeneralan instruadan fakon. Ankaŭ la *Latina Amerika Kongreso de Kuracistoj* en Rio de Janeiro rekomendis la uzadon de Esperanto por internaciaj publikaĵoj. La universitato de Pittsburg (Usono) konsentis starigi kursojn, kondiĉe ke la tiea Esperanta societo donu profesorojn.

Novaj grupoj inter **Studentoj** estas citindaj en Berlino; Lejpsigo kaj Munĥeno; la libera studentaro de tiuj urboj favoras nian movadon; ankaŭ en Prago kaj Budapeŝto ekzistas esperantistaj grupoj inter studentoj; tiu de Moskvo kalkulas 120 anojn. La Humboldt-akademio en Berlino havas kurson; en la artmetia lernejo de Moskvo ekzistas grupo kaj la direktoro de la simila instituto en Limo (Peruo) organizas duonjaran kurson en sia lernejo.

Komercaj lernejoj en Aŭgsburgo (la direktoro estas prezidanto de la tiea grupo), Krakau, Leeds, Prago kaj Vieno donis kursojn, la komerca muzeo en Prago organizas specialan instruadon por instruistoj.

Ke la **Instruistaro** pli kaj pli fariĝis favora, tion montras la oldono de « *Pedagogia Revuo* ». La *Internacia Profesora Unuiĝo* en 21 landoj kalkulas 500 anojn. La ligo de la institutoj de Lancashire-Cheshire enkondukis Esperanton kiel instruadan fakon, kaj ligo de anglaj profesoroj organizis ekzamenojn pri Esperanto. En Angers ekzistas asocio de esperantistaj instruistoj en la provinco.

Nekalkuleblaj estas ĉiuj ceteraj **Lernejoj** kie pli aŭ malpli oficiale, libere aŭ devige oni akceptis instruadon pri Esperanto; jam el Jerusalemo kaj Nova-Zelando ni ricevis tiascencajn informojn; el Germanujo, kiu, pro sia rigida regularo, de malproksime ne atingas la progresojn faritajn en Britujo kaj ĉefe en Francujo, estu nomataj Donauwörth, Gotha, Hanovro kaj Lubeko.

Rilate al **Asocioj inter lernantoj**, ĉe gimnazioj kaj aliaj lernejoj mezgradaj, Francujo aperas sur la unua linio kun 15 grupoj, inter ili unu grupo de lernantinoj. Eĉ en Japanujo ekzistas asocio de lernantoj esperantistaj.

En diversaj **Institutoj por Blinduloj** oni enkondukis instruadon pri Esperanto; la intereso en tiuj medioj estas tiel granda, ke ĉe la kongreso por blinduloj en Napolo, propono de profesoro el Belgujo (Frato Izidoro) por enkonduki Esperanton en la blindulejojn trovis unuaniman akcepton.

* * *

La Publikaj estraroj povas, speciale pro niaj kongresoj, montri sian intereson al nia movado. Tio okazis, krom eble en Rusujo, laŭ nepra bonvolema senco. Estu rememorata pri la Barcelona kongreso; ankaŭ estas citinda la partopreno de la ŝtat-kaj urb-estraro en la kongreso de Gotha. Okaze de la rumana nacia kongreso la reĝino Elizabeto (Carmen Sylva) sin montris ege favora al Esperanto kaj promesis lerni la lingvon. En Samos la revuo *Greklingva Esperantisto* estas senpage presata en la ŝtata presejo. En Meksikujo la estroj de tri ŝtatoj ordonis la abonon de la tiea «*Esperanta gazeto*» al diversaj institutoj kaj bibliotekoj. En Brazilujo la statistika oficejo publikigis en Esperanto memorajon; en Rio de Janeiro oni trovas en la doganaj kaj telegrafaj oficejoj afiŝojn en Esperanto. La urbestro de Wellington (Nova Zelando) estas prezidanto de la tiea esperantista societo. En Chemnitz 47 urbaj oficistoj partoprenis en kurso, pri kiu la urbestro pagis parton de la salajro al la profesoroj.

Ankaŭ la **Policanaro** montras kreskantan intereson. Oni anoncis la ekzistadon de kursoj en Amsterdamo, Aŭgsburgo, Dresdeno kaj Galatz. En Budapeŝto kaj Hilversum (Holando) ekzistas grupo inter policianoj. La «*Polica Klubo*» en Parizo estas oficiale rajtigita. En Galatz Esperanto fariĝis deviga fako por policianoj.

En la **Milististaro** la progresoj estas iom pli malrapidaj, nur pri naŭ kursoj en francaj kazernoj kaj unu en la marista lernejo de Vladivostok la raportanto sciigis. Cetero la itala militista gazeto «*Illustrazione militare italiana*» de nun enhavas Esperanto-artikolojn el la plumo de nia sperta propagandisto Prof-ro Giambene. En la numero de 20a de Januaro li parolas pri la ĝisnunaj sukcesoj de nia lingvo ĉe la militistaroj; li

citas, krom Franc- kaj Rusujo, ankaŭ Anglujojn, Belgujojn, Usonon, Hispan-, Bulgar-, Sved- kaj Japanujojn. Ankaŭ el Aŭstrujo oni povas citi sukcesojn, la itala militistaro estas atakata de Esperanto per la citita ĵurnalo, kaj ŝajnas ke la germana estos la last-lasto. Pli impresbla medio estas la **Ruĝa Kruco**. Kursoj estas signalitaj el Antverpeno (*), Dresdeno kaj Königsberg. Memorindaj estas la manovroj kiuj okazis en la Barcelona parko, sub la gvidado de Generalo Priou, prezidanto de la Franca Esperanto-Societo por Ruĝa Kruco.

Fine jetante rapidan rigardon sur niajn *Revuojn* kaj nian *Literaturon*, ni ankaŭ tio konstatas ĝogĵigan pliriĉigon. Inter la proksimume 100 gazetoj, 25 estas eldonataj en la franclingva teritorio, inter ili 13 tute en Esperanto.

Kaj tiuj poste venas la germana lingvo-teritorio kun 17 gazetoj, el kiuj 4 tute en Esperanto. Inter la plej interesaj novaperintaj estas nomindaj «*Universo*», daŭrigo de «*La bela Mondo*», «*La Duonmondo*» kaj fine la propaganda gazeto «*Rund um die Welt*» (Ĉirkaŭ la Mondo). El la angla lingvo-teritorio ni konas 12; eble ekzistas iaj pliaj grupaj organoj. Rimarkinde estas ke eĉ ne unu el tiuj aperas tute en Esperanto.

La aliaj lingvo-teritorioj estas Hispanujo (8+2, aldonite Meksikujo kaj la sudamerikaj ŝtatoj) Bohemujo (2+2), Portugalujo (3), Holando, Japanujo, Hungarujo, Rumanujo, Finlando Grekujo, Italujo, Kroatujo, Norvegujo kaj Polujo (1+2) (**).

* * *

La finon de la pasinta jaro karakterizis ĝenerala, entuziasma festo tra la tuta Esperantistujo. Ĉiuloke oni solene rememoris la 50-an naskiĝan feston de nia honorata Majstro. Li ĝuu ankoraŭ multajn jarojn da benricâ laboro, kaj post la festaro, ke la *Zamenhofa fondajo* restu kiel ĉiama rememoro pri la memorinda tago! Ke multaj partoprenu en ĝi plej kore, tial ke la fondajo fariĝu beno por la homaro, ĉar ankaŭ post la triumfo de nia Esperanto sin montros novaj celoj al Esperantismo, por kiuj estos la kaŭzo oferi tempon, monon, forton kaj koron, laŭ la ekzemplo kaj la senco de l'Majstro.

(*) Tute ne forgesinda estas la kurso, jam de tri jaroj plej sukcesplene organizita en BERCHEM, popola antaŭurbo de Antverpeno. (Trad.)

(**) La raportanto verŝajne ne trovis rubrikon por enmeti nian revuon *Belga Esperantisto*, eble ĉar Belgujo estas dulingva lando. (Trad.)

Kun la ĝoja sento, kiun donas sukcesplena laboro, ni salutas kun nova kuraĝo kaj nova espero la novan jaron!

Vivu D-ro Zamenhof!

Vivu nia Esperanto!

Kun la afabla permeso de l'aŭtoro

AMATUS

esperantigis.

LA BALEARAJ INSULOJ

Palma de Majorko

(Daŭrigo kaj fino)

Posttagmeze komenciĝis nia ekskursaro tra la insulo.

Oni aljungis fortikajn ĉevalojn al oportunaj kamparaj veturiloj, en kiujn ni ensidiĝis kvarope. La societo konsistis el dekvin geesperantistoj kaj unu profanulo, ingeniero el Baskolando, kun kiu ni konatiĝis en Barcelono, kie li loĝis en la sama hotelo kiel ni. Dum la veturado, liaj kunveturantinoj parolis kun li pri Esperanto, kaj tiel sukcesplene, ke li firme promesis dediĉi al nia movado sian tempon kaj sian fervoron.

La plej rekomendindaj ekskursoj en Majorko estas al *Valldemosa*, *Miramar*, *Deya* kaj *Soller*. Mi vizitis tiujn ravajn ejojn dum plej favora vetero kaj plej agrabla temperaturo, meze de afablaj kunvojaĝantoj, tra alridanta, plej pentrinda pejzaĝo. Unuvorte, ĉio kunagiĝis por plezurigi la ekskurson.

Komforta vojo nin kondukis al *Valldemosa*. Ĉiuflanke ni remarkis olivarbojn kaj oranĝujojn; en la fundo de la panoramo altiĝis imponantaj rokoj. Fine ni alvenis en la urbeto, alta je 437 metroj super la marnivelo. Ĉirkaŭ ni sin montris plej fruktodonaj kampoj kun ĉiuspecaj fruktarboj. Tie kreskadas superflue la karubujo, la figarbo, la daktilujo, la vinberujo, la migdalujo, kaj ĉefe la olivarbo. Nenio pli stranga kaj kaprica ol tiu lasta. Ĉiuj trunkoj havas malsaman aspekton, unuj ŝajnas dikkorpaj malgranduloj, aliaj gigantaj monstroj. La foliaro estas palverda, kaj similas tiun de niaj salikoj.

Valldemosa estas rava ejo. Ĝia paroĥa preĝejo altiĝas super la domaro en kies mezo ĝi staras; la iama Alkazarro estas nuntempe la tre vizitinda monaĥejo de la Kartusianoj. Granda ĝardeno ĉirkaŭas ĝin, kun ĉiuspecaj kreskaĵoj kaj multkoloraj kaj bonodoraj floroj. Vere, tiu ĉarma loko pensigas pri la Paradizo. La turistoj ne preterlasas viziti la turon de *San Gual*, de kie oni ĝuas belegan vidajon sur la Mezan Maron.

De *Valldemosa* al *Soller* la vidajo prezentas novajn surprizojn. La pejzaĝo estas jen sovaĝa, jen gaja. Superbelaj estas

la vidpunktoj, kaj majeste aperas al ni la blua, kvieta maro okcidente.

Jen *Miramar*, posedataĵo de la arĥiduko Ludoviko Salvatoro de Aŭstrujo, mirinde bela restadejo, kreita de sia posedanto, kiu faris el ĝi nepriskribebla mirindaĵo. Oni povas viziti la kastelon kaj la parkon; la bieno etendiĝas sur la tuta ĉirkaŭanta regiono ĝis la maro. La kastelo estas konstruita sur la sama loko, kie Ramon Lull kreis sian kolecion, kaj ĝi enhavas kelkajn rimarkindajn antikvaĵojn. La ĝardenego de *Miramar* posedas la tutan kreskajaron de Majorko. De la montplataĵo de *Miramar* la okulo povas observi la tutan insulon kun ĝia pentrinda montaro, ĝiaj valoj kaj ebenajoj, riĉaj kampoj kaj vinberejoj. Ĉiuflanke nin alridas la bela, la ĉielblua maro.

Post agrabla tagmanĝo en *Miramar*, ni daŭrigis nian ekskurson ĝis *Soller*, industria urbeto kun 9000 loĝantoj. Oni trapasas la vilaĝeton *Deya*, kaj tre sovaĝan intermontaĵon. La urbo *Soller* troviĝas en ĉarma valo, meze de oranĝarbaroj, kaj havas havenon, je 4 kilometroj de si.

Nuntempe oni povas veturi de *Soller* ĝis *Palma* fervoje tra la montaro. Tiu veturado estas pli rapida, sed kompreneble, malpli agrabla kaj interesa.

Majorko estas reale favoritulino de la naturo. Ne nur ĝi posedas riĉajn minejojn, sed sub ĝia benata klimato ĉiuj tropikaj floroj kreskas en plena aero. Ducent dek-ok specoj da birdoj loĝas en la insulo, el kiuj cent dek-unu dum la tuta jaro. La aglo kaj la vulturo tie eljetas sian raŭkan kriadon, sed ankaŭ resonas la bela kantado de la najtingalo kiu sin kaŝas en mirta arbareto. Plie la merlo, la ruĝkolo, la alaŭdo, la hirundo, la pasero gajigas la kampojn kaj la arbarojn.

La granda okupado de la Majorkanoj estas la fiŝkaptado, kiu estas tre produktema. Inter la multspecaj fiŝoj troviĝas la flugantaj fiŝoj, kiuj saltetas sur la ondoj kaj multege alvenas sur la marbordo. Multnombraj dombestoj kaj kortbirdoj vivas en la insulo; la ĉevalo, la azeno, la mulo, la bovo, la porko, la ŝafo, la kapro, la hundo, la kato, — la kokino, la kolombo la ansero, la meleagro. La majorka mulo tre utilas al la kamparanoj; ĝi eĉ superas la ĉevalon.

La loĝantoj de Majorko iomete similas la Maŭrajn rasojn; la viroj estas altkreskaj, kun bruna vizaĝkoloro; ili estas gajaj, afablaj kaj gastemaj; la virinoj estas mezkreskaj, ankaŭ kun bruna vizaĝkoloro; ili distingiĝas per sia eleganteco kaj afableco. La nacia vestaĵo, kiu bedaŭrinde iom post iom malaperas, estas tre pentrinda.

La majorka popolo estas sobra ; la apudeco de la maro, la korpaj ekzercoj, la laborado sur la kamparo kaj la marveturado, ĉio kunagas por ĝin fariĝi sana kaj fortika. La moraleco de la Majorkanoj estas ekzempla kaj imitinda.

Ĉar la insulo enhavas riĉe ĉiujn rimedojn por la vivado, estas malofte ke Majorkanoj ĝin forlasas. Antaŭ kelkaj tagoj mi tamen konatiĝis en Bruselo kun fruktvendisto el Majorko. Aŭdante ke mi vizitis lian patrujon, la bona viro estis tute emociata. -- Ho ! li diris, parolu al mi pri mia amata insulo ! De dek jaroj mi ne plu vidis ĝin, kaj ĉiutage mi ankoraŭ pensas pri mia kara hejma lando.

La Majorkanoj havas sian propran literaturon. La tradukon de la malnova poeziaro kaj la eldonon de ĝi oni ŝuldas al la arĥiduko Ludoviko Salvatoro. La popolo havas belajn legendojn kaj tre ĉarmajn kantojn.

La danco estas granda plezuro de la loĝantaro. Plej gracie ili dancas la *Fandango*, la *Fota*, la *Bolero*, la *Manola*. En Palma oni ankaŭ dancas laŭ la moderna maniero. La junularo ofte organizas gimnastikajn festojn kaj turnirojn. Bedaŭrinde en Palma estas tre ŝatataj la bataloj de kokoj kaj la kurludoj de toroj...

Ekleziaj ceremonioj estas prifestataj kun granda lukso, ĉar la Majorkanoj estas tre piemaj. Oni ĉefe solenigas la Palmdimanĉon, la grandan Jaŭdon, la grandan Vendredon kaj la Feston de Dio. La tagon de la festo de la Vaksandeloj (2an de Febr.) la urba konsilantaro ĉeestas la Diservon kaj disdonas vaksandelojn kaj ĉiuspecajn donacojn al la popolamaso.

La kastiljana lingvo estas deviga en la insulo, sed la popola idiomo estas la majorka, kiu similas la katalunan. Esperanto trovas jam multajn adeptojn ; esperantistaj grupoj ekzistas en Palma kaj en Mahon, ĉefurbo de Menorko. Ju pli da eksterlandanoj vizitos la balearajn insulojn, des pli grava fariĝos la neceseco ellerni kaj disvastigi nian karan lingvon, tiom por la turistoj kiom por la insulanoj, kiuj nur konas sian propran idiomon kaj por kiuj estos tute ne eble, lerni la lingvojn de siaj diverslingvaj gastoj.

Mia vojaĝo al Majorko por ĉiam restos unu el la plej agrablaj rememoroj el mia vivo, kaj tien reiri, unu el mia plej fervoraj deziroj.

MARIA MOREAU.

Zamenhof kaj la premio Nobel

Nesciantaj aŭ malbonintencaj personoj disvastigis falsajn kaj bedaŭrindajn dirojn rilate al la petskribo sendita al la komitato Nobel pri D-ro Zamenhof.

Jen precizaj informoj pri la afero.

Dum la esperantista kongreso de Genevo (1906), tri ĉekaj

grupoj prononis esprimi la deziron, postuli por D-ro Zamenhof la Nobel-premion de la Paco, ĉiujare aljuĝatan al personoj, kiuj faris grandajn servojn al la universala paco.

La ĝenerala sekretario de la kongreso, S-ro Gaston Moch, raportante pri tiu propono, rimarkigis ke la rajto por prezenti kandidatojn nur apartenas al arigoj, figurantaj sur listo, kiun li komunikis (Membroj de la norvega Nobel-komitato, de la diverslandaj parlamentoj, de la Interparlamenta Konsilantaro en Berno, de la Instituto de Internacia Legoscienco, de la Profesoroj de legoscienco, de historio kaj de filozofio, de la Universitatoj kaj de la laŭreatoj de la Nobel-premio de la Paco). Konsekvence li konkludis konsilante al la esperantistoj sin turni al tiuj diversaj organismoj por apogi la kandidatecon de D-ro Zamenhof.

Sekve de tiu informo, la anglaj esperantistoj sukcesis akiri la subskribon de 12 membroj de la Komunuma Ĉambro (House of Commons) en Londono. Tiuj ĉi en tre bone redaktita letero (publikigita en la *Yorkshire Daily Observer* de la 12a de Novembro 1906) prezentis al la Komitato Nobel la kandidatecon de nia kara Majstro.

Antaŭ nelonge, je l' fino de l' festeno por prifesti la 50an naskiĝtagon de D-ro Zamenhof, ĉiuj kunmanĝantoj aklame decidis subskribi petskribon, celantan novan proponon por aljuĝigi la Nobel-premion al la genia kreinto de Esperanto.

Tuj la Centra Oficejo sin priokupis por regularigi la demandon kaj sukcesis kunigi pli ol kvardek subskribojn de francaj parlamentanoj, senatanoj kaj deputatoj, ne kalkulante la leterojn senditajn individue de reprezentantoj de pacifistaj societoj kaj profesoroj de la Universitato.

(Laŭ « Franca Esperantisto »).

ESPERANTO FACILA

Zsss !... zsss !...

Spund reiris hejmen malfrue ; Ŝpund drinkis 1) ; Spund marsis ŝanceliĝantez).

Tiuj tri faktoj okazis ankoraŭ antaŭ tiu ĉi nokto. Sed neniam nia amiko tiom suferis pro kapdoloro kiom nun.

Kutime 3), tia kapdoloro (france : mal aux cheveux, — germane : Katzenjammer, — angle : hot coppers) vizitis lin nur la morgaŭan tagon, tiel kiel alveninte per regula rapidvagonaro 4). Nun ĝi jam sentigis sin en sia tuta terureco. Tio ne estas honesta, pensis Ŝpund.

Frostis 5). Brrr !... Liaj lipharoj enhavis porcion 6) da natura glacio. Liaj senregulaj paŝoj sonadis bruege en la silentaj stratoj.

Ĉar jam estis la unua nokte. Jen la fromaĝvendejo, kie li loĝas. La mastrino kompreneble dormis. Time li enŝovis la

ŝlosilon en la ŝlosilingon. Kia feliĉo ! estas tiun ĉi fojon la bona ŝlosilo : Ŝpund sukcesis malfermi la pordon.

Lia kontenteco estis tiom ega, ke, traŭrante la butikon, li renversis turon da holandaj fromaĝeroj.

Ho ! la falo okazis preskaŭ senbrue. Sed kia mizero por rekonstrui la fromaĝan turon en la mallumo ! Pro tiu grava laboro lia kapdoloro duobliĝis. Kun cent sopiroj 7) sinceraj, li supreniris per la mallarĝa ŝtuparo. Kaj li faris al si mem la promeson (centafoje !) ke estonte li nur trinkos bieron, kiam li soifos... Malfeliĉe, Ŝpund ĉiam soifas !

Senbrue li alvenis en sia dormoĉambro. Li nur havis ankoraŭ unu deziron : bone dormi, forgesi ĉion, precipe sian kapdoloron. Do rapide li senvestigis sin, levis la litkovrilojn kaj... Ho ! bona ideo ! Li lavos sin antaŭ ol enlitiĝi. De sia studenta tempo, Ŝpund konas tiun faman rimedon kontraŭ drinkulkapdoloro. Li plenigis sian pelvon 8) per akvo, miksitita kun glacio, kaj naŭfoje enigis sian malsanan dikajn kapon en la tre freŝan akvon. Tiam li saltis en la lito.

Efektive, li faris pli bone. La doloro forflugis, sed la kapo nun estis tre varma, tro varma.

Ŝpund ne povis dormi. Li pensis...

Li pensis pri sia estinteco, estanteco kaj estonteco ; li pensis pri siaj amitinoj, amatinoj kaj amotinoj.

Li komprenis ree, ke la sola solvo 9) de lia senregula vivo estas : edziĝi. Li promesis al si mem (centafoje !) tre serioze pripensi tiun gravan aferon morgaŭ matene.

Sed li vane penis dormi. Tiam li decidis kalkuli de 1 ĝis 1000 : ĉar tio ankaŭ estas bona rimedo por ekdormi.

Li ĵus alvenis ĉe la nombro 500, kiam li aŭdis strangan bruon en sia ĉambro, ian bruon kiel : zsss !... zsss !...

Kion signifis tio ? Ĉu estis la spirado 10) de iu ŝtelisto sub la lito ? — Ne, ne eble, la bruo estis tro delikata.

Zsss !... zsss !... Ba, pensis Ŝpund, estas dolĉe varme en mia lito, mi nun ne volas okupi min pri tia stulta brueto. Li metis sin sur la dekstran flankon, kaj, por ne plu aŭdi la bruon, li kovris la nudan oreilon per la litkovriloj.

Sed la mistera brueto obstine daŭrigis kaj traboris 11) la litkovrilojn : zsss !... zsss !...

Jen Ŝpund eligis la kapon el la lito kaj buŝe blovis, kvazaŭ por forpeli 12) fremdan katon : sss !... sss !...

Efektive la bruo silentis dum unu momentoto. Sur la maldekstra flanko Ŝpund tiam volis dormi. Ho ! kiom li ĝuos la dormon en la varma lito !

Zsss !... zsss !... « Diablo ! » Ŝpund saltis el la lito, ekbruligis la lampon, kaj ekserĉis la kaŭzon de la bruo delikata sub la lito, sur kaj sub la tablo, en la ŝranko, en ĉiu angulo de la ĉambro.

Sed pro siaj dormemaj okuloj, li trovis nur teruran malvarmon.

Li do ree enlitiĝis dum la bruo daŭrigis, kaj, dank'al sia laceco, li fine ekdormis...

Kiam Ŝpund ekvekis la morgaŭan tagon, la unua bruo, kiun liaj oreloj kaptis, estis : zsss !... zsss !...

Sed nun, li ne estis plu ebria. Li forlasis la litojn, metis sian pantalonon, kaj, per akutaj oreloj kaj klaraj okuloj, li serĉis.

Tiam, fine ! li ekkonis la kaŭzon de la mistera bruo. Li vidis ke la akvo en lia pelvo estas tute kovrita per glacio, kaj sur tiu glacio li trovis... du pulojn 13), kiuj glitis 14) jam dum la tuta nokto.

SKALDO.

Klarigoj: 1) drinki, veel drinken, boire beaucoup; — 2) ŝanceliĝante, waggelend, titubant; — 3) kutime, gewoonlijk, d'habitude; — 4) rapidvagonaro, sneltrein, train express; — 5) frosti, vriezen, geler; — 6) porcio, portie, portion; — 7) sopiroj, zuchten, soupirs; — 8) pelvo, waschkom, bassin; — 9) solvo, oplossing, solution; — 10) spirado, ademhaling, respiration; — 11) trabori, doorboren, percer; — 12) forpeli, wegjagen, pourchasser; — 13) pulo, vlooi, puce; — 14) gliti, glijden, glisser.

ESPERANTO EN BRUGO

La dua nacia esperantista kongreso, okazonta je la 15-16a de Majo, atentigas speciale pri Bruĝo, la nunjara rendevuo de la belga samideanaro.

Jam nia afabla kunlaborantino, F-no Bertha Ledène, priparolis en la Februara numero de « Belga Esperantisto » la ĉarmojn de Bruĝo la bela, la originala kaj poezia ejo, kun ĝia imponanta belfrido, — ĝiaj pentrindaj kanaloj, trafendataj de grupoj da blankaj cignoj, — ĝia kvietaj, reviga lago de Amo kaj fine ĝia vasta kaj komforta haveno, de kiu Bruĝo atendas la renaskiĝon de la iama prospero kaj riĉeco.

Ne nur ĉiuj ĉi admirindaĵoj igas la belgajn esperantistojn ami Bruĝon kaj incitos ilin ĉeesti la kongreson, sed ili scias ke Bruĝo estas ankaŭ urbo, kie la Zamenhofa lingvo, tiel kara al ilia koro, plene floradas kaj prosperadas. Ili scias ke en Bruĝo ili renkontos aron da viglaj, deciditaj kaj simpatiaj kunlaborantoj kaj ili havas la antaŭan certigon pri la afabla akcepto, kiu ilin atendas tie.

La Bruĝa grupo, kiu alprenis nian signifan nacian devizon « Unueco donas fortecon » estas la plej malnova el Belgujo. Efektive, ĝi estas fondita dum Oktobro de 1902, en epoko, kiam Esperanto en nia lando estis nur tre konfuzo konata kaj tute ne organizita.

Kiel la fondintojn de la Bruĝa grupo oni devas konsideri S-ron Witteryck, la ĝisnunan prezidanton kaj S-ron leŭtnanton Lekeux, la unuan sekretarion. S-ro leŭtnanto Lekeux estis por S-ro Witteryck tre agema kunlaboranto. Bedaŭrinde, dejoraj devoj lin vokis, dum la monato Decembro 1906, en alian garnizon-

on. Lin anstataŭis, sukcesplene, S-ro Leŭtnanto Van Weyenbergh, kiu kore kaj anime sin dediĉis al la interesoj de la grupo, ĝis kiam ankaŭ pro deĵoraj motivoj li devis forlasi la urbon kaj ekŝiĝis (Majo 1908). De tiam la ofico estas konfidita al F-ino Bertha Ledène, kiu, plej laŭdinde, plenumas la sekretarian taskon.

Dum la tuta daŭro de la ekzistado de la Bruĝa grupo, ĝiaj anoj distingigis per granda aktiveco, tiom pri la lernado de la lingvo, kiom pri nelacebla propagando.



S-ro Barono A. RUZETTE.
Foto: HERMANS, Bruĝo.
Lati desegnaĵo de FL. AERTS.

Cetere la Bruĝa grupo organizas de tempo al tempo tre sukcesantajn festojn, kiuj konservas inter ĝiaj membroj la bonan spiriton de amikeco kaj frateco.

Ĝi estas unu el la plej multnombraj de Belĝujo; ĝi abonis la ĉefajn esperantistajn ĵurnalojn kaj havas bibliotekon; ĝiaj membroj korespondas kun samideanoj el ĉiuj mondpartoj.

Dum 1908 la Bruĝa grupo aliĝis al la Belga Ligo Esperantista kaj difinis kiel delegitojn S-rojn Witteryck kaj leŭtnanton Van Weyenbergh, anstataŭitan en Oktobro 1908 de F-ino Bertha Ledène.

En 1905 S-ro Witteryck, prezidanto de la grupo, ĉeestis la unuan tutmondan esperantistan kongreson en Boulogne s M; tri

Potence ili influis sur la publikan opinion en sia urbo. Tiun celon ili atingis per multaj artikoloj enpresigitaj en la Bruĝaj ĵurnaloj, kaj ĉefe per multaj publikaj paroladoj, kiuj konigis Esperanton al la tuta Bruĝa loĝantaro. Inter tiuj estas ĉefe ciindaj la paroladojn de S-ro Komandanto Lemaire (1906) kaj de S-ro Carlo Bourlet (1909), kiuj ambaŭ kunigis grandan kaj elektitan aŭdantaron. Inter la ĉeestantoj oni rimarkis la tiaman provincestron, S-ron Baronon de Béthune, kaj la nunan, S-ron Baronon A. Ruzette - van Caloen de Basseghem, kaj diversajn membrojn de la urba konsilantaro, unuvorte, la tutan Bruĝan eminentularon.

anoj de la grupo, F-ino De Cavel, S-oj Witteryck kaj Van Weyenbergh partoprenis en tiu de Cambridge (1907). S-ro Witteryck tie vokis la atenton de la tutmonda samideanoj sur sian urbon, kaj invitis ilin ĝin viziti. La alvoko ne estis vana, kaj de tiam multaj fremdaj esperantistoj vidigas en Bruĝo, kie ili estas gvidataj de komplezemaj kaj afablaj samideanoj.

Ĉiam memorinda restos la bedaŭrinda skismo, kiu senigis la belgan esperantistaron de kelkaj el siaj anoj, kiuj pretekstante plibonigi la lingvon, nur efektivigis haltigi momente la propagandon kaj naski dubon pri la sukceso de nia movado. Niaj Bruĝaj amikoj, unuanime, decidis resti fidelaj al la Zamenhofa Esperanto kaj daŭrigi sian fidon en la Lingva Komitato. Ili atestis sian lojalismon en fiera deklaro, legita dum la ĝenerala kunveno de la Ligo, la 20an de Septembro 1908, kaj kunhelpis efike por restarigi la Ligon sur firmajn fundamentojn kaj reenigi en ĝin la internan ideon de ĝia regularo. Je tiu okazo estis rimarkinda la energio, per kiu S-ro Witteryck, prezidanto de la Bruĝa grupo, defendis la verajn interesojn de Esperanto, kaj konvinkis multajn dubulojn.



Advokato J. SCHRAMME,
Skabeno de publika instruado en Bruĝo.
Foto: Ruys, Bruĝo.

Tre notinda estas la fakto ke la Bruĝanoj sukcesis akceptigi la honoran prezidantecon de sia grupo de Lia Barono Moŝto, S-ro A. Ruzette - van Caloen de Basseghem, provincestro de la Okcidenta-Flandro, kaj la honoran vicprezidantecon de S-ro Schramme, advokato, kaj Skabeno de la Publika Instruado. Jen evidentaj pruvoj, kiuj montras, kiom alte Esperanto estas taksata en Bruĝo kaj grandvaloraj garantioj pri la fina triumfo.

La historio de Esperanto en Bruĝo tute kunmiksiĝas kun la agado de la nelacebla kaj lerta prezidanto de la tiea grupo, S-ro Witteryck.

La 7an de Oktobro 1901, legante hazarde iun francan ĵurnalon, li konatiĝis kun Esperanto. Tuj li petis de Pariza libristo pliajn informojn kaj mendis la bezonatajn lernolibrojn. Post nelonge li plenumis sukcesplene la ekzamenon kiel adepton de la S. F. P. E. kaj aliĝis tiun organiston. La jarlibro de 1901-

1902 enhavas lian nomon kune kun tiu de lia kunlaboranto de la unua horo, S-ro leŭtnanto Lekeux.

S-ro Witteryck konatiĝis la sekvantan jaron kun S-ro D-ro Seynave, el Kortrejko, kaj kun kelkaj tiamaj esperantistoj ; li partoprenis en la fondo de la esperantista revuo « Belga Sonorilo », kies presado li akceptis, kaj kies unua numero aperis la 15an de Septembro 1902.

De tiam S-ro Witteryck sin rimarkigis per sia senĉesa fervoro. Li verkis kaj publikigis lernolibrojn, propagandajn broŝurojn, muzikajojn, literaturajn verkojn. Li faris paroladojn en multnombraj

Brugaj societoj, kiel *Vlaamsche Broederband*, *Willemsfonds*, *Davidsfonds*, *Sindikato pri komerco kaj industrio*.

Li ne nur parolis en sia urbo, sed li faris propagandon en Ostendo, S-ta Trudo kaj aliloke. Ĉiu parolado enigis en la esperantistajn vicojn grandan aron da adeptoj. Li organizis kursojn en diversaj kvartaloj de Bruĝo, kaj se decas citi la sindonan kunlaboron de S-roj Lekeux,

Van Weyenbergh, Van Haecke kaj aliaj, oni ne povas preterlasi konstati ke S-ro Witteryck konserv-



S-ro WITTERYCK
Foto: WATTEYNE, Bruĝo.

is por si la gravan parton de la laboro.

Je la fino de Decembro 1906, ni lin vidas instruanta tri kursojn, inter kiuj unu en angla lingvo.

Kiel verkisto kaj presisto S-ro Witteryck faris grandajn servojn al la esperantista movado. Li prizorgis la eldonon de multaj libroj pri kaj en Esperanto. Jam dum 1902 li disdonigis 5000 ekzemplerojn de flandra propaganda broŝuro, titolita: *Zegepralende oplossing van het vraagstuk der Wereldtaal*. La saman jaron li aperigis la bonegan libron *Het Esperanto in tien lessen*, laŭ la famkonata *L'Esperanto en dix lecons*. Intersekve li eldonis *Paĝoj el la flandra literaturo* (1904), de M. SEYNAEVE kaj R. VAN MELCKEBEKE, la unuan, similan verkon eldonitan en Esperanto; *Floroj Esperantistaj*, kvin tre rekomendindajn libretojn (1903-1907); *Companion of the english Esperantist* (1906); *Blinda Rozo* (1906), de S-ino VAN MELCKEBEKE-VAN HOVE; *Spraakleer en oefeningen van de internationale wereldtaal Esperanto*, door SEBRUYN-VROMANT (1907); *Résumé de la grammaire Esperanto* par le L. COL. de TROYER

(1907); *Volledige spraakleer van Esperanto* (1907); *Zakboekje van den Vlaamschen esperantist* (1908); *Ŝi ne legos ĝin*, premiitan monologon de D-ro W. VAN DER BIEST (1909); *L'Esperanto en cinq leçons* (1909) kaj *L'Esperanto pour tous* (1909).

Mi ne forgesu citi la ilustritan revuon *De Lusthof*, redaktitan kaj eldonitan de S-ro Witteryck, aperintan de 1902, kun ĉiumonata paĝo dediĉata al Esperanto.

S-ro Witteryck, kiu ne sensukcese kulturis la muzikarton, komponis tre belajn esperantistajn kantojn. Inter ili estas citindaj: *La vento*, *Sekreta vivado*, *Kion vi deziras? S-ta Nikolao*, *Antaŭen Bruĝanoj!* *La vojo* kaj *Apud la lulilo*. Oni ŝuldas ankaŭ al li belan melodion laŭ la esperantista himno *la Espero*.

Li estas (kiel dirite) prezidanto de la Bruĝa grupo, vicprezidanto de la Belga Ligo Esperantista, prezidanto de la ekzameno por la akiro de profesora kapableco kaj ano de la Lingva Komitato. De 1906 li posedas la diplomon pri profesora kapableco, aljuĝitan de la S. F. P. E.

Estis por mi reale agrabla tasko konigi per tiu artikolo la energian, indan kaj lertan samideanon, kiu tiom faris por nia movado.

De ok jaroj S-ro Witteryck servas Esperanton per sia talento, per sia koro. Lia fervoro, lia entuziasmo ĉiam restas verdaj, kiel la emblema koloro de nia standardo. Malavare li ĉiam finance apogis ĉiujn esperantistajn entreprenojn.

Li akceptu tie ĉi la publikan dankesprimon de siaj multnombraj amikoj. Granda ĝojo estos por ili renovigi tiun dankon okaze de la Bruĝa kongreso, tiu granda festo de samideana frateco, kiun ili senpacience atendas.

AMATUS.

HUMORAĴOJ

LA FRENEZULO KAJ LA ĈASISTO

La pafilon sur la ŝultro, la ĉasajujon sur la dorso kaj kondukante sian ĉevalon per la brido, ĉasisto haltis antaŭ la pordo de granda frenezulejo por trinkigi sian ĉevalon al la fonto.

Unu el la malsamuloj, kiu kun sia flegisto sin montris ĉe la enirejo, venis al li kaj inter ambaŭ okazis la jena interparolado.

— Vi havas belan ĉevalon, diris la frenezulo, kiom ĝi valoras?

— Ĝi kostas du mil kvincent frankoj, respondis la ĉasisto.

— Kaj kiom kostas la pafilo?

— Ne pli malmulte ol sepcent kvindek frankojn.

— Kaj viaj du hundoj?

- Ĉiu minimume ducent kvindek frankojn.
- Kaj kiun vi havas en via ĉasajujo?
- Unu skolopon.
- Kaj kiom estas la prezo de la skolo?
- Nuntempe, kvin frankoj, se mi ne eraras.
- Mia kara amiko, konkludis la frenezulo, saltu plej baldaŭ sur vian ĉevalon kaj forraĵdu tuj, ĉar, se nia direktoro sciigus, ke tie ĉi estas inteligenta homo, kiu elspezas trimil sescent kvindek frankojn por mortigi unu birdon, kiun oni povas aĉeti por kvin frankoj, li senprokraste enfermigus vin.

AMARA AMINDAĴO

Snobs tagmanĝis ĉe Bobs, kaj lia apetito tute ne estis kontentigita. Ĉe la foriro la invitinto premis la manon de sia gasto kaj diris al li plej amike:

- Nu, mia karulo, kiam vi faros al mi la plezuron, denove tagmanĝi ĉe mi?
- Ho! repondis Snobs malice, se vi volas, tuj!

CERTA MONO

Luigantino. — S-ro Doktoro, kiam mi fine ricevos vian jam tiom longe prokrastitan luprezon?

Aŭtoro. — Kara sinjorino, vi nenion perdos kaj certe estos pagata per la mono kiun mi ricevos de mia eldonisto, se tiu akceptas la romanon kiun mi ekskribos, tuj kiam mi estos trovinta taŭgan subjekton kaj la necesan inspiradon.

NOVAJ ĴURNALOJ

Diversaj novaj esperantistaj ĵurnaloj aperis dum la lasta tempo.

Inter ili estas ĉefe citindaj:

La Duonmonata, redaktoro: KARL STEYER; eldonisto: JOHANNES HEYN, Thomasring, 6, *Leipzig*. La revuo estas alterne ilustrata, kaj enhavas artikolojn pri la vivo de la Esperantistaro sur ĉiuj kampoj de la homa spirito. Ĉiu numero enhavas (23×16) 16 paĝojn; la abonprezo estas Sm. 1.75.

Juneco, organa oficiala kaj ĝenerala informilo de la franca federacio de la junaj esperantistoj, (24×16) 12 paĝoj. Abonprezo: Fr. 4 = Sm. 1,60. Redaktejo kaj administrejo, 152, Boulevard Raspail, *Paris VI*.

Varme rekomendata al la esperantista junularo!

Semo, monata gazeto, eldonajo de la Barcelona societo «Paco kaj Amo», (16×12) 8 paĝoj, abonprezo: Sm. 1.— Administrejo: Strato Montseny, 67, 2^a, *Barcelono*.

Rund um die Welt, eine Zeitschrift für Esperantisten und solche, die es werden wollen, unter steter Mitwirkung von Regierungsassessor Dr ALBERT SCHRAMM und Pr. Dr

SIEGFRIED LEDERER, (24×16) 24 paĝoj. Abonprezo: 3 Mk = Sm. 1,50; *Wolfenbüttel*, Heckner's Verlag.

Tiu ĉi revuo estas grandparte germanlingve redaktata; ĝi certe faros grandajn servojn, speciale en Germanujo.

Nederlanda Katoliko, maandblad, officieel orgaan van den Nederlandschen R. K. Esperantistenbond «Nederlanda Katoliko»; (21×14) 18 paĝoj. Abonprezo: Gl. 0.60 = Sm. 0.55. Cefredaktoro: J. N. J. SMULDERS, kuracisto en *Schijndel*; administranto: JOH. LÜNEMAN, Van der Neerstraat, 40, 's *Hage*.

La celo de la ĵurnalo estas interligi la membrojn de la societo N. K., kaj plifaciligi la esperantistan propagandon inter ili.

Sciigante sian programon al sia legantaro, nia nova kolego konkludas jene:

«Ni uzados la *Zamenhofan* Esperanton sendiskute; ni volas esti laboremuĵoj, ne revemuĵoj.»

Al ĉiuj, tutkoran bonvenon!

AM.

BIBLIOGRAFIO

«Belga Esperantisto» nur recenzas la verkojn senditajn al ĝi en du ekzempleroj. Adreso: Arendstraat, 26, Antwerpen, (rue de l'Aigle, 26, Anvers)

I. **Presejo Alb. Kündig**, Ĝenevo.

RENÉ DE SAUSSURE. — *Geometrio de «Folietoj»* aŭ *Geometrio folietara* (26 × 18) 72 paĝoj. Prezo: Sm. 1.—

II. **Esperanto-oficejo** en Pleven (Bulgarujo).

IVAN KRESTANOF. — *Fedin ĉas esperanto*, (18 × 12) 20 paĝoj. Prezo: 25 stotinkoj = 10 sd.

Tiu libreto estas la bulgara tradukaĵo de la konata teatraĵeto *Une heure d'Esperanto*, de S-ro Cart. Ĝi estas la unua numero de la *Bulgara esperantista biblioteko*, kiu baldaŭ publikigos *Sur la vojo al internacia lingvo* de la sama aŭtoro.

Mi deziras al la B. E. B. plenan sukceson kaj gratulas tutkore S-ron Krestanof pro lia iniciativo.

III. **British Esperanto Asocion**, 133, High Holborn, London, W. C.

A.) AD. ŜEFER. — *Tekstaro de bonkonataj britaj kantoj*, (18 × 11) 40 paĝoj. Prezo: 12 sd. = fr. 0.30.

Jen kantaro enhavanta kvindek da kantoj laŭ konataj kaj amataj melodioj.

Kantante ni laboru, estas la devizo de F-ino Ŝefer. Kantado la esperantistaro, kiu trovos riĉan provizon en la citita libreto. La uzataj melodioj estas ankaŭ ĝenerale konataj en nia lando, kiel *Home, sweet home*, *The last rose of summer*, *Robin Adair*, *Where are you going, my pretty maid?* *God save the King*, k. c.

La prezo — 30 centimoj — estas tre malalta, kaj ĉiu esperantisto volos aĉeti la verketon.

B). A. L. STEVENSON. — *Doktoro Jekyll kaj sinjoro Hyde*, esperantigis WILLIAM MORRISON kaj WILLIAM W. MANN. — (18×14), 96 paĝoj. Prezo: 1 ŝilingo = Sm. 0.5.

Konatiĝante per Esperanto kun la alilanda literaturo, oni ankaŭ konatiĝas kun la vivmaniero, la speciala karaktero de alilandanoj, kaj jen certe unu el la plej interesaj flankoj de nia movado. Tiu ideo denove venis al mi, dum mi legis la verkon esperantigitan de S-roj Morrison kaj Mann, kiu ege ĉarmis min per sia originaleco kaj bonstileco.

La libro meritas honoran lokon en la biblioteko de ĉiu esperantisto.

IV. J. Espasa é Hijos, editoros, 579, Calle Cortes, Barcelona.

SANTIAGO RUSINOL. — *Folioj de la Vivo (Fulls de la Vida)* esperantigita de ALFONSO SABADELL. (30×12) 104 paĝoj. Prezo: 1 fr = Sm. 0.4.

S-ro Sabadell, la simpatia prezidanto de la Barcelona esperantista grupo, kun kiu multaj geesperantistoj konatiĝis dum la 5a kongreso, jen publikigas tradukon de kataluna verko. Tiele li servas, ne nur sian patrujon — propagandante la katalunan literaturon — sed ankaŭ, kaj ege, la Esperantismon, ebligante al la samideanoj la legadon de belstila kaj altidea libro, kun granda zorgo kaj talento tradukita.

Tiu ĉi libro estas serio da sendependaj ĉapitroj kungrupigitaj en kvar arojn: printempaj folioj, someraj, aŭtunaj kaj vintraj. Admirindaj estas la sentemeco de la aŭtoro kaj la nepra originaleco de la verko, kiun oni vane provus kompari kun io simila.

«Folioj de la Vivo» estas vera pliriĉiĝo de la esperanta literaturo, kaj ĉiuj, kiuj interesiĝis je «Paĝoj el la flandra literaturo» kaj je «Pola antologio» kun granda plezuro nun konatiĝos kun ero de la kataluna libraro.

